nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2019

## EKSPOZICIO POR LA EŬROPA TAGO DE LA LINGVOJ

Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj, kiun oni festas ĉiujare la 26an de septembro, estis muntita en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio ekspozicio de libroj tradukitaj al Esperanto, devenantaj el 35 eŭropaj lingvoj. La ekspozicio estis muntita la 23an de septembro, kaj la 30an Madrida Esperanto-Liceo organizis komunan laŭtlegadon de pluraj pecoj de tiuj libroj. ATENTU: la ekspozicio estis plilongigita ĝis la venonta 7a de oktobro, do vi ankoraŭ povos ĝin viziti tiun tagon, koincide kun la vizito de István Ertl (vidu poste)



Krome, okaze de tiu Tago, HEF estis invitita de EUNIC, la asocio grupiganta la oficialajn institutojn de lingvoj, por agado en kiu oni instruis diversajn lingvojn en tre rapidaj prezentadoj laŭ metodo nomata “Speak dating”. Ĝi okazis la 27an de septembro, en la sidejo de la Goethe-Institut de Madrido, kaj pri ĝi zorgis Alex Escobedo, kiu profitis la okazon ne nur por montri la ĉefajn ecojn de Esperanto sed ankaŭ por diskonigi la venontajn kursojn en la ĉefurbo.

## PRELEGO KAJ RENKONTO KOMENCE DE OKTOBRO

En oktobro venos al nia urbo la konata verkisto kaj aktivulo István Ertl. La lundon 7an de oktobro en la HEF-ejo li prezentos sian lastan verkon, kiu temas pri: «Vi(d)vokroniko, aŭ: Dek ok monatoj». Kiel li prezentas ĝin: “Kiel enŝtrumpetigi cindrojn de edzino? Kion fari pri ŝminkiloj sur banĉambra breto? Kiel kutimiĝi al ploratakoj? Kiam rigardi aliajn virinojn? Kien meti amon kies objekto malaperis?”

Trafu ĉi tiun ŝancon, paroli kun elstara beletristo kaj aŭskulti alt-kvalitan aplikon de la lingvo Esperanto.

István probable povos partopreni ankaŭ en la unuasabata ĉiumonata renkontiĝo. En oktobro ĝi okazos la 5an, je la 6a vespere, en la kafejo de la kulturcentro MEDIALAB-Prado (strato Alameda, 15, proksime al CaixaForum). Ni anoncos la eventon en diversaj forumoj, por instigi novulojn kaj komencantojn, kaj ni kalkulas ankaŭ je la ĉeesto de alia hungardevena esperantisto, Tomaso.

## LA 12AN KOMENCIĜOS NOVA KURSO

Konfirmiĝis la komenco de nova kurso en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo (strato Rodríguez San Pedro, 13), la sabatojn inter la 11a kaj 13a horoj. Ĝi komenciĝos de la baza nivelo, la 12an de oktobro, kaj ĝin gvidos Pedro Hernández.

Ankoraŭ eblas aliĝi al la kurso. Por tio, bv kontakti kun la Liceo en la adreso: madrid@esperanto.es.

Memoru krome ke eblas studi Esperanton neĉeeste en la kurso de la Centro por Instruado de Lingvoj (CUID) de la Universitato UNED, oficiale je nivelo A2. Jam malfermiĝis la periodo por enskribiĝo, kaj vi povas konsulti ĉiujn detalojn en la retejo https://www.cuid.uned.es/.

## INVITO POR PARTOPRENI EN TEATRAĴO

Jen interesa propono por partopreni en teatraĵo kiu havas scenojn en Esperanto.

Kiel ni antaŭanoncis en la julia numero de tiu ĉi bulteno, fine de novembro oni prezentos en la kulturcentro Matadero (Legazpi), teatraĵon en kiu Esperanto ĝuos gravan rolon, jam de la titolo: "Rompu, rompu!" (tiel, en Esperanto kaj kun jena, same esperante formulita klarigo: "rompu, rompu la murojn inter la popoloj!"). Miguel Fernández esperantigis la tekston de la tria akto, kie Esperanto rolas, kaj Alejandro Pareja instruas la aktorojn pri prononcado.

Nun oni serĉas figurantojn (laŭ PIV: aktoro, kiu ne gravas por la intrigo kaj prezentas nur neparolantan figuron). Ili reprezentos la "esperantistan brigadon", grupon de idealistoj pretaj doni sencon al nia nuntempo, kies nacio estas la tuta homaro. Ne gravas aĝo, sekso, nek fizika aspekto, kvankam oni valorigos konojn de Esperanto, danco kaj kantado. La provludoj komenciĝos meze de oktobro. Interesatoj sendu viajn datumojn aŭ fotojn al la retadreso: blanca.gracia.gallego@gmail.com.

## POEZIA RADIA PREZENTADO

Denove Miguel Fernández partoprenis en poezia prezentado en Radio Utopía. Tio okazis la 28an de septembro, okaze de la protestoj rilate al klimatŝanĝo. Li deklamis poemojn en Esperanto, akompanate de aliaj famaj nuntempaj poetoj. La elsendon eblas aŭskulti en la retejo de la programo, ĉe la adreso: http://www.radioutopia.org.es/espacio-utopia-sabado-28-septoembre-2019-12-00-h-poetas-clima/.

## JUNULARA RENKONTO EN KANTABRIO

Memoru ke, kiel antaŭgustumo de la venonta hispana kongreso de Esperanto, okazonta en la urbo Comillas, en Kantabrio (al kiu, cetere, eblas jam aliĝi kaj koni aliajn detalojn ĉe: http://www.esperanto.es/kantea/), la junulara asocio HEJS anoncis renkonton de junuloj, la t.n. Benkontiĝo 2019, kiu disvolviĝos en Santandero, inter la 10a kaj 13a de oktobro. Por koni ĉiujn detalojn, kontaktu kun la asocio HEJS per ĝia retpoŝto hejs@esperanto.es, aŭ per ties sociaj retoj.




## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30, kiel tradicie. La unuasabata renkontiĝo okazos la 5an de oktobro, je la 6a horo, en Medialab-Prado.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com